# Radio Ĉerizo 15

Jarfino

Baldaŭ finiĝas ĉi tiu jaro, kaj venas la nova jaro. Januaro estas la speciala monato por plejmulto da japanoj. En la japana lingvo, nomoj de monatoj estas laŭnombraj;

"iĉi-gatu", la unua monato, por januaro,

"ni-gatu", la dua monato, por februaro,

"san-gatu", la tria monato, por marto, kaj tiel plu. Kaj inter ili la unua monato havas alian nomon "syoogatu"; iuj diras, ke "syoo" havas signifon de "renovigo" aŭ "purigo". Tiu aserto estus ĝusta; ni ja sentas renovigon de la jaro kaj si mem.

Ni tre ofte sendas novjarajn salutkartojn, sur kio ni ofte skribas tipajn salutojn: "Gratulon al Malfermo de la Nova Jaro", kaj "Gratulon al la Nova Printempo". Ĉu vi sentas stranga, kaj dubas, ĉu ĝi devas esti nova "jaro" anstataŭ nova "printempo"? Ni devas retrovidi historion iomete.

Nuntempe printempo estas marto, aprilo kaj majo en Japanio. Tamen antaŭ cent jaroj oni vivis en la luna kalendaro, tial la printempo estis de januaro ĝis marto. Tia kutimo restas en la salutkarto ĝis nun.

Ĉi-jare en Japanio okazis multaj tragedioj; fatalaj tertremoj, cunamoj, forpaso de dudek mil personoj, akcidento de nuklea centralo, kaj eksplodoj de vulkanoj preskaŭ mil fojojn. Dume ni povis okazigi komunan kongreson japana-korean, kio progesigis nian interkompren-iĝon trans la maro, kaj kio donis al mi rolon de akceptejo, parolado en la ceremonio, amika muzikado en vespero, kaj prezido de fakkunsido, pro kio mi elkore dankas al ĉiuj ĉeestintoj.

Ĉi tie anonco al vi: ĉi tiu sonmaterialo enhavas subtitolon en si. Aŭskultu per Vindoza “Media Player”, kaj vi vidos mian parolon. De menuo iru al “ludi”, “subtitolo”, “starti” sur ĝi.

Radio Ĉerizo esperas al vi esperantistoj bonan jarfinon, kaj preĝas pli prosperan novjaron. Do, ĝis reaŭdo!